# Amikeco tridekdujara

Mia unua kontakto kun Fabrizio estis fakso de 1991-11-19 de li al mi. Temis tiam pri Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli. Tamen ni renkontiĝis persone nur en Rejkjaviko en 2013, kie ni manĝis kune kaj multe parolis, i.a. pri la persa reĝo Mithradatha. En 2013 temis pri leterinterŝanĝo pri la vojaĝo en norda Svedujo de la grafo Carl Mörner, kiu verkis pri tiu vojaĝo en la sveda lingvo. Mi helpis mian torinan amikon pri transkribo de malfacile legebla tekso kaj pri traduko en Esperanton, kiu koncernis veran konservativulon: Leonard Fredrik Rääf, kiu kontraŭis la konstruadon de fervojoj (ĉar la sistemo uzi ĉevalon ja bonege funkciis), kaj la enkondukon de popolaj lernejoj (ĉar ili detruas la tradiciajn sciojn de la popolo). Jen ion por lerni!

Poste, en 2021, temis pri korespondado kun Charles Häberl, ebla kandidato por membreco en Akademio Comenius, fondita en Kopenhago en 1986. Mi samtempe menciis mian verkadon pri la ruslingva gramatiko de jido, verkita de L. Zamenhof ĉirkaŭ la jaro 1881, sed publikigita nur en 1982. Pri ĝi mi publikigis kaj libron en Esperanto kaj ĉapitron en la angla, ambaŭ eldonitaj fare de Petro Chrdle.

*Christer Oscar Kiselman*
Universitato de Upsalo
christer.kiselman@math.uu.se